

FESTO DE LA ĈIELIRO DE LA SINJORO - 16an de majo 2010

DUM LI BENIS ILIN LI ESTIS SUPRENPORTITA EN LA ĈIELON- Komentario al la Evangelio de P.Alberto Maggi OSM

Lk. 24, 46-53

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj Tiel estas skribite, ke la Kristo devas suferi, kaj leviĝi el la mortintoj la trian tagon; kaj ke konvertiĝo kaj pardonado de pekoj estu predikataj en lia nomo al ĉiuj nacioj, komencante ĉe Jerusalemo.

Vi estas atestantoj pri tio. Kaj jen mi elsendos sur vin la promeson de mia Patro; sed restu en la urbo, ĝis vi vestigōs per potenco de supre.

Kaj li elkondukis ilin ĝis apud Betania, kaj, levinte siajn manojn, li benis ilin. Kaj dum li benis ilin, li foriĝis de ili kaj estis suprenportita en la ĉielon. Kaj adorkliniĝinte al li, ili revenis al Jerusalemo kun granda ĝojo; kaj estis konstante en la templo, glorante Dion.

Estas tre amara la fino de la Evangelio laŭ Sankta Luko. Post tiom da laciĝoj, post tiom da agoj de Jesuo kun siaj disĉiploj, ŝajnas ke ili ĝuste nenion komprenis. Sed ni tion vidu.

Dum Li aperas al siaj disĉiploj kiel resurektinta, Jesuo daŭrigas sian instruadon kaj li klarigas al ili ke “Tiel estas skribite, ke la Kristo devas suferi, kaj leviĝi el la mortintoj la trian tagon”, la nombro tri ne indikas nur kronologian limdaton, sed ĝi eĉ signifas kompletecon, tutecon. Jesuo estos mortigita sed poste li denove komplete kaj tute vivos.

“Kaj en lia nomo”, en la nomo de la Kristo, “Estos predikataj al ĉiuj nacioj”, ĉi tie la evangeliisto uzas la terminon “nacioj” kiu indikas la paganajn popolojn, do, la mesaĝo de Jesuo ne estas nur adresita al Jerusalemo, sed ĝi estas universala, adresita al la tuta homaro. Kaj kio estos predikata? “la konvertiĝo”, tio estas, la vorto uzata de la evangeliisto por “konvertiĝo” indikas ŝanĝon de pensmaniero kiu poste fariĝas ŝanĝo de sinteno. Tio signifas direkti diversmaniere sian propran vivon.

Se vi ĝis nun vivis por vi mem, nun vi vivu por la aliuloj. Tiu ĉi estas la konvertiĝo kiun Jesuo petas ke oni prediku. Nu, ĉi tie, bedaŭrinde, la traduko diras : “la konvertiĝo kaj la pardono de la pekoj”, kvazaŭ estu anoncataj kaj predikataj du malsamajn aferojn. Tute ne, temas pri “konvertiĝo por la

pardono de la pekoj”. Tiu estas la sama esprimo kiun Johano la Baptisto uzis kiam li anoncis bapton kiu estas signo je konvertiĝo por la pardono de la pekoj.

Estas la konvertiĝo, la definitiva ŝanĝo de propra vivo kiu akirigas la punnuligon, la forviŝadon de la pekoj alceligante nian vivon al la bono de la aliuloj. La termino “pekoj” ne indikas la kulpojn de la homoj, sed ĝi indikas la maljustan pensinklinon de la vivo mem. “Komencante ĉe Jerusalemo” en la hebrea lingvo Jerusalemo, la Sankta urbo.

Kaj Jesuo anoncas ke li sendos super ilin tiun kiun la Patro promesis, nome la Sanktan Spiriton, la saman amforton, la saman povon de Dio, tamen Jesuo petas. “Vi restu” kaj la evangeliisto ĉi tie uzas la verbon “resti sidantaj”, do “restu senmovaj”, ĝis vi vestiĝos per potenco de supre.”

La disĉiploj ankoraŭ ne havas la Spiriton kiu manifestiĝos al ili en la tago de la Pentekosto, tiam Jesuo invitas ilin resti trankvilaj. “Poste li elkondukis ilin”, la verbo “elkonduki” estas la sama kiu estas uzata en la libro de Eliro por indiki la liberigon kiun Dio donis al sia popolo; do, kion Jesuo faras estas la konkludo de lia Eliro, nome, li elportas siajn disĉiplojn el la religia institucio, kiu ne plu estas tero de libero, sed estas tero de sklaveco kaj de morto.

“Li elkondukis ilin ĝis apud Betania, kaj, levinte siajn manojn, li benis ilin. Kaj dum li benis ilin, li foriĝis de ili kaj estis suprenportita en la ĉielon”. Estas nur la evangeliisto Sankta Luko kiu priparolas al ni la ĉieliron de Jesuo, tiun kiun ni trovas en la evangelio laŭ Sankta Marko estas posta sekva aldonaĵo, sed ĝi ne apartenas al la origina teksto de la evangeliisto. La ĉieliro de Jesuo ne signifas malproksimecon, sed eĉ pli intensan ĉeeston; ĝi ne estas disigo sed unuigo al la disĉiploj dum ilia aktivado.

Esti suprenportita en la ĉielon ne signifas spacnivelon, ‘ĉielo’ estas unu el la terminoj kiun oni uzis por indiki Dion. Jesuo tiu kiu estis mortkomdamnita kiel krimulo manifestas la grandecon de Dio. Tio lin ne disigas disde la homoj sed eĉ lin unuigas al ili por potencigi ilian aktivadon.

Nu, jen la drama, neatendita, seniluziiga konkludo, “Adorkliniĝinte al li, ili revenis al Jerusalemo”, Jerusalemo, la Sankta Urbo, loko de la religia institucio, “kun granda ĝojo”, preskaŭ triumfantaj, kaj ni neniam estus atendantaj tian konkludon, “kaj ili estis konstante en la templo, glorante Dion”.

Ĉu en la templo? Sed ĉu ili ne ekvidis ke kiam Jesuo mortis la vualo de la templo duonrompiĝis kaj montris ke nenio estis ene de ĝi? Ĉu ili ne rememoras kiam Jesuo nomis la templon kovejo de ŝtelistoj kaj rabistoj? Sed, ĉu ili ne rememoras kiam Jesuo diris al ili ke “tiu ĉi templo estos detruita”? Nu, la allogo de la religio, de la religia institucio estas pli forta ol la instruado kaj ol la sinofero de Jesuo.

“Ili revenas en la templon por glori Dion”. La evangeliisto finas en drama maniero, kiel se li dirus: “kaj ili nenion komprenis”. Necesos ankoraŭ interveno de Jesuo, necesos la descendo de la Sankta Spirito, ankoraŭ necesos multaj okazaĵoj antaŭ ol la komunumo komprenos ke ĝi devas forlasi Jerusalemon por sin malfermi al la pagana medio por alporti al ĝi la universalan amon de la Sinjoro.